Ekskursoj: 2 kursoj iom riĉaj estos pretaj!

1: Al la urbeto Miyama, vilaĝo kun fragmit-tegmentoj!

Kolektiĝo ĉe la stacidomo Sonobe de JR. Oni veturos buse. La urbeto Miyama estas nomata la Tegmento de Kioto, kuŝas preskaŭ meze de Prefektujo Kioto kun riĉa verdo kaj ĝi estas en regiono kun vilaĝoj agrikultura kaj monta, riĉaj je naturbelo kun pura akvofluo.

El la popolanaj domoj konstruitaj laŭlonge de la rivero, proksimume 250 domoj estas laŭtradiciaj fragmit-tegmentaj domoj, kaj precipe en la Norda vilaĝparto restas multaj tiaj domoj (ĉ. 30); tie la aspekto de naturo kaj la fragmit-tegmentaj loĝdomoj en bona harmonio prezentas tian etoson, kiun oni povus nomi la prapejzaĝo de la japana agrikultura vilaĝo. Tiu ĉi vilaĝparto estas selektita kiel "konserva kvartalo de grava, tradicia konstruaĵaro" de Kultura Buroo. La tagmanĝon oni prenos ĉe "Kuirejo Yururi (administrata de s-ro Mayao Umesao)", kie estas irorio kaj oni ĝuos la tagan menuon el riĉaj manĝmaterialoj ĉefe el Miyama (3 000 enoj por la tagmanĝo estas inkluzivita en la vojaĝkostoj).

* Minimuma nombro por la efektivigo: 30 personoj (maksimume ĝis 40: akceptataj laŭvice de aliĝintoj; kun la akompano de gvidanto de Nisitetu-Ryokô).

La 11an de oktobro tagmeze je la 12a horo oni kolektiĝu ĉe la stacidomo Sonobe de JR: ekveturo (estos en ordo kun siaj pakaĵoj).

De stacidomo Kioto ekveturos: 11:04, ĉe stacidomo Sonobe alvenos 11:45, per rapida trajno necesas 41 minutoj, kostas 570 enojn. De stacidomo Kioto ekveturos: 11:25, ĉe stacidomo Sonobe alvenos 11:54, per limigita ekspreso Kinosaki n-ro 1, kostas 1 510 enojn.

Stacidomo Sonobe —› urbeto Miyama, tagmanĝo ĉe Kuirejo Yururi —› promeno al kaj ĉirkaŭ la Material-Domo de la fragmit-tegmenta vilaĝeto —› busa veturo ĝis stacidomo Kioto kaj disiĝo.

2: Vagoneta trajno ~ Malsuprenveturo tra la rivero Hozu; promenado en Sagano!

Kolektiĝo ĉe la stacidomo Saga-Arasiyama de JR. Per la vagoneta trajno oni veturos al Kameoka; tagmanĝon oni ĝuos ĉe "Rakurakusô", ĉefe el manĝmaterialoj de la sezono. Oni povos ĝui ankaŭ la japanstilan kaj okcidentstilan domojn, kiuj estas registritaj ĉe ŝtato kiel formohavaj kulturtrezoroj, kaj la majstroverkan ĝardenon el 2 150 kvadrataj metroj faritan de Uezi. Poste oni venos al la rivero Hozu, kaj havos plezuron ege agrable malsuprenveturi en proksimume 2 horoj la intermontan fluon je 16 kilometorj kun multe tremiga sperto ĝis Arasiyama, Kioto. La korpa sento, kiun oni ricevas fluigata kvazaŭ glite sen rezisto, estas la prapatro de "Torento-glito", atrakcio de plezurparko. Ties imponeco, agrabla sento venas de nenio krom la konforma terena formo, kiun faris la granda naturo, kaj la bona ekvilibro, kiun tenas la superba lokacio, kaj certe la tekniko de la remistoj sperte stangumi. Bonvolu plene kontentiĝi per rakontoj de la remistoj kaj amuzaj objektoj de la naturo. (2 000 enoj por tagmanĝo estas inkluditaj en la ekskursaj kostoj.)

* Akceptataj ĝis 34 personoj (Laŭvice de la aliĝoj; kun akompananto de Nisitetu-Ryokô).

La 11an de oktobro je la 11a kaj duono oni kolektiĝos ĉe la stacidomo Saga-Arasiyama kaj ekveturos (estas en ordo kunporti pakaĵojn). De la stacidomo Kioto ekveturi je la 10:38, alveni ĉe la stacidomo Saga-Arasiyama je la 10:54; Kioto: 10:55 —› Saga-Arasiyama: 11:11; de la kajo "Vagoneta Saga" oni ekveturos je la 11:28 ĝis "Vagoneta Kameoka", de kie per mikrobuso oni venos al "Rakurakusô"; tagmanĝo —› la rivero Hozu —› Arasiyama, disiĝo surloke (eblas tamen veturi per senpaga mikrobuso ĝis la stacidomo Kioto).

nordo

Kultura vojkruciĝo el ĉiuj direktoj: okcidento + oriento

sudo

La 90a Japana Esperanto-Kongreso

en KAMEOKA

2003. 10.11-13

tria informilo

Tempo: 2003.Okt.11 (sab.)~ 13 (lun. ferio)

Loko: Galleria Kameoka Kyôto-hu, Kameoka-si, Amarube-tyô (Apud la nacia ŝoseo n-ro 9)

De la JR-linia stacidomo Kioto veturi 30 minutojn sur la linio Sagano kaj malsupreniri ĉe stacidomo Kameoka; piede en 20 minutoj, taksie 5minute oni atingos la lokon.

Organizantoj: Japana Esperanto-Instituto, Konstanta Kongresa Komitato, Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto

Subtenantoj: diversaj komunumoj, organizaĵoj (en negocado)

La delikata fluo de la rivero Hozu, kiu donas plej bongustan akvon en la regiono Kinki; la koloroj de la kvar sezonoj teksas mildan montaron kaj tie kuŝas vasta kamparo. La geografia karakterizaĵo najbare al la urbeca sfero de Kioto, Osaka kaj Kobe, kaj la altgrada aliro ebligas ĝui urban funkcion, kaj tiel Kameoka estas urbo, kie la mirinda naturo kaj la komforta vivspaco estas en bona harmonio.

Laŭhistorie, kiam la ĉefurbo estis ne sole en Kioto, sed eĉ en Nara, tiu ĉi Tanba-Kameoka estis en la grava etapo sur la landovojo liganta la Japan-Maran flankon kaj la ĉefurbon kaj, kiel montras tion la miksekzisto de jaŝiroj Hata-familiaj, Izumo-liniaj kaj korteg-liniaj, estis tia regiono, kie interfluis multaj kulturoj: ĝuste, sur tiu kultura vojkruciĝo okazos la Japana Kongreso.

Ni elkore atendas la aliĝon de multaj interesitoj.



Kongresa Programo (en projekto)

11an (sab.) Ekskursoj (eksplikoj aparte)

12an (dim.)
Antaŭtagmeze:
09:00 Kongresejo malfermita
09:30 Giĉetoj
10:00 Giĉetoj; Kelkaj programeroj komenciĝas
12:00 Tagmanĝo
Posttagmeze:
13:00 Inaŭguro
14:30 Prelego (preleganto en negocado, ĝis la 16a horo)
18:00 Fakkunsidoj finiĝas
18:30 Bankedo (mendintoj)
21:00 Ties finiĝo

13an (lun. ferio)
Antaŭtagmeze:
09:00 Kongresejo malfermita
09:30 Komenciĝas fakkunsidoj
12:00 Tagmanĝo
Posttagmeze:
13:00 Fakkunsidoj
14:30 Ferma Soleno
15:30 Fermo

*Aliro

Preninte matenmanĝon en hotelo, lante-promenante oni atingu la stacidomon Kioto. De tie per linio Sagano de JR oni veturos 30 minutojn ĝis Kameoka; de antaŭ la stacidomo Kameoka ĝis la kongresejo funkcias ekskluziva aŭtobuso, kiu ĝin atingos en 5 minutoj proksimume. Vesperiĝe, kaj ankaŭ vespere la aliro estos evidenta. Kompreneble, de la stacidomo Kameoka ĝis la kongresejo oni rajtus daŭrigi la promenon…! Tiam oni bezonos piede ĉ. 20~30 minutojn.

*Bankedo; Tagmanĝo

La loko estos en la kongresejo. Ni petas vin mendi ilin samtempe, kiam vi aliĝos al la kongreso. Ni preparos iom da porcioj, sed en tre limigita kvanto, por tiu tago mem. Cetere, por la tagmanĝoj ekzistas restoracio en la kongresejo kaj iom da manĝejoj proksime.

*Mendoj de loĝejo kaj ekskurso

Por la aranĝo de loĝejoj kaj ekskursoj respondecos Akcia Kompanio Nisitetu-Ryokô, Osaka-Tyûô-Filio. Por la loĝado ni tenas ĉ. 200 litojn en 5 biznes-hoteloj antaŭ la stacidomo Kioto. Ĉiu estas atingebla en 5 minutoj piede de la stacidomo. La prezoj estos por nokto jenaj tri kategorioj: 8 500 enoj, 10 000 enoj, 12 000 enoj.

Bonvolu mem mendi al la jena adreso. Ĉe la mendo bonvolu klare komuniki: por loĝi je la japana kongreso; esperanto-ekskurso.
Krome, ni estos je via dispono aranĝi biletojn ĝis Kameoka (fervoja, aviada). Bonvolu senĝene vin turni al ni.

(A. K.) Nisitetu Ryokô, Osaka-Tyûô-Filio
〒541-0041
Osaka-si, Tyûô-ku, Kitahama 3-5-29
TEL 06-6222-2791
FAX 06-6229-2457
Deĵorantoj: Kasahara, Yamasita

Kotizoj kaj aliaj

Aliĝoj akceptataj

	Ĝis 2003.Marto 31	Ĝis Julio 31	De Aŭg.01
Ĝenerale:	5 000 enoj	6 000 enoj	7 000 enoj
Handikapitoj:	2 000 enoj	3 000 enoj	4 000 enoj
Samfamilianoj:	2 000 enoj	3 000 enoj	4 000 enoj
Junulo/alilanda studento:	2 000 enoj	3 000 enoj	4 000 enoj
Mez- kaj altgrada lernanto:	1 000 enoj	1 500 enoj	2 000 enoj
Malpliaĝa ol elementlernejano inkluzive:	500 enoj	700 enoj	1 000 enoj
De alilando 10 000 enoj			
Morala aliĝo 3 000 enoj			
Memorfoto 1 000 enoj			
Tagmanĝo (Okt.12: dim.) 1 000 enoj			
Tagmanĝo (Okt.13: ferio) 1 000 enoj			
Bankedo (Okt.12 vespere) 8 000 enoj			
Ekskurso urbeto Miyama 10 000 enoj (Al Nisitetu)			
Ekskurso Rivero Hozu 7 000 enoj (Al Nisitetu)			

•Bonvolu aliĝi kun la aliĝilo enmetita kun la necesaj enskriboj. Cetere, la personoj jam aliĝintaj kun mendoj bonvolu noti tion en la rubriko por komuniko.
•“Junulo/alilanda studento” signifas junulon, kiu naskiĝis post 1978.Jan.01 aŭ alilandan studenton en Japanujo.
•Al la moralaj aliĝintoj ni ekspedos, postkongrese, la memoraĵon kaj la kongresan raporton.
•La kotizo por aliĝinto de eksterlando nome 10 000 enoj inkluzivas aliĝkotizon, loĝkostojn por Okt.11/Okt.12 plus manĝkostojn (sed, Bankedo ne estas inkludita). La pagon ni petos surloke en la kongresejo tiutage (la personojn, kiuj aliĝos en tiu ĉi kategorio, ni petos loĝi kaj manĝi en Anseikan-Domo de Oomoto-Centro).
•Mendojn por ekskursoj bonvolu fari rekte al Nisitetu-Ryokô, Osaka-Tyûô-Filio (Vidu la maldekstran paĝon). Rim. Tiutaga kosto por tagmanĝo estas inkluzivita en la kotizo por ekskurso.

*Pri mendoj por fakkunsidoj, kongressalonoj, diversaj budoj bonvolu sin turni al Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, postulante mendilojn.
Mendlimo: la lasta tago de junio.
*Belartaj konkursoj (originalo, traduko): la koncernan regularon bonvolu peti de JEI.
*Ekzamenoj de lingvaj kapabloj (1a~4a gradoj) kaj nova ekzamenprovo.
Ekzamenkostoj: 4a grado 1 000 enoj; 3a grado 2 000 enoj; 2a grado 3 000 enoj; 1-a grado 5 000 enoj.
Nova ekzamenprovo: 500 enoj. Pri la ekzamenoj kaj provo bonvolu informiĝi ĉe JEI.

Viajn proponojn kaj opiniojn je la Kongreso bonvolu sendi al: s-ino Doi, KKS (ĉe JEI), aŭ LKK (Kancelario de EPA).

Aliĝoj kaj demandoj akceptataj ĉe:
EPA: Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto
Kyôto-hu, Kameoka-si, Ten'onkyô 〒621-8686 Tel. 0771-22-5561
http://www.epa.jp/jek90/ esperanto@oomoto.or.jp